

## & Brumm kaj Pipenbek:

< Rekante 17 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Notoj (\*): '1 Elparolu "Pipen-bek"'.>

### (#Melodio:

<:33> (

/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La3;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La a

)×5 )+

### (&Strofoj:

#### **,& I-a Etaĝo. Du amikoj:**

'1 /Du amikoj tre intimaj ; Jam de jaroj pli ol dek ; – (Kvankam mense ne proksimaj) – ; Estas Brumm kaj Pipenbek.

(×:; **Amiko mia male diras ; Pike li parolas, tiras ; kun sentencoj nur sen senco ; mian paciencon longe.**)

'2 Brumm severmiene portas ; La sekecon de skelet' ; Kaj pofunte li eksportas ; Piajn pensojn de asket'. .....

'3 Pipenbek dikega estas; Pekemulo kun cinik'; Nur barakte li digestas ; La predikojn de l' amik'. .....

'4 Tial ambaŭ sin renkontas ; Kiel fajtro kaj glaci' ; Kaj porpruve mi rakontas ; Pecojn de l' konversaci'.. .....

#### **,& II-a Etaĝo. Malbonaj argumentoj de Pipenbek:**

'5 Iun tagon, senavize ; Ĉel' amiko venis Brumm, ; Kaj li trovis lin surprize ; Dum senhonta amindum': .....

'6 Tie Pipenbek prezidis ; Al intima idili' ; Tie virineto sidis ; Sur la sofo apud li. ....

'7 Tiam Brumm pri l' katastrofo ; Blekis per tremanta voĉ': ; "Ve! – Sur sia propra sofo ; Li sin donas al diboĉ'!" .....

'8 "He pardonu", furioze ; Pipenbek nun grakis pli, ; "Ni ĵus studis serioze ; Iom da filozofi'. .....

'9 Se vi estus filozofo ; El la skol' de l' realism', ; Vi komprenus, ke la sofo ; Estas bazo de l'.. Sofism'!" .....

'10 Brumm ĉikane reparas ; "Tio ŝajnas stranga stud', ; Vi kaj ŝi ekscite bolas ; Kiel par' dum am-prelud'.." .....

'11 Pipenbek responde bruas, ; Ke per seka teori' ; Ni ne tiom nin instruas, ; Kiom per alegori'. .....

'12 "Nun komprenu, apostolo, ; Ke ni bolis tie ĉi, ; Nur ĉar ĉiu.. para bolo ; Estas mem alegori'!" .....

#### **,& III-a Etaĝo. Brumm siaflanke provas spriti:**

'13 Iun tagon Brumm promenis ; Tute sola tra l' arbar', ; Kiam jen renkonte venis ; Sur la vojo iu par'.. .....

'14 Kaj indigne Brumm rekonis ; La amikon Pipenbek, ; Kiu kun virin' friponis ; Sur la lim' de l' Sesa Pek'. .....

'15 Sed tuj Pipenbek frivola ; Ŝiris sin el la brakum', ; Lasis la virinon sola ; Kaj alkuris nun al Brumm: .....

'16 "Ho karega, ĝis ĉi tie ; Vin kondukis bona vent'!" ; Brumm respondis ironie: ; "Dankon pro la kompliment'. .....

'17 Sed mi vidas ke mi ĝenis ; Vin dum  
ĉarma rendevu', ; Ĉar jam antaŭ ol mi  
venis, ; Ŝajnas, ke vi estis du!" .....

'18 "Tro severe vi mezuras", ; Pipenbek  
ekskuzis sin, ; "Mi sincere al vi ĵuras, ;  
Ke mi eĉ ne konas ŝin .....

'19 Estu certa, ke resume ; Mi ne estas  
tia brut', ; Nur.. apenaŭ palpebrume ;  
Mi respondis al salut'." .....

'20 "Jes, sendube, – palpebrume", ;  
Brumm konkludis, – "Bone, sed ;  
..*Palpe* multe pli ol..*Brumm'e*, ; Tio  
estas mia kred'!" .....

**,& IV-a Etaĝo. Brumm kaj  
Pipenbek parolas pri la vetero:**

'21 Iun tagon, frumatene ; Ambaŭ  
marŝis tra la land', ; Kiam sinjorin'  
senĝene ; .."Strange sidis" ĉe l'  
vojrand'. .....

'22 Pipenbek ĉi tiun bildon ; Tuj  
absorbis kun avid'; Brumm permane  
faris ŝildon ; Por protekti son de l' vid',  
.....

'23 Kaj por kapti bonintence ; La  
atenton de l' amik' ; Brumm parolis nun  
sentence ; Pri l' vetero kun taktik': .....

'24 "Bela tago, mia kara, ; Vere dolĉa  
majmaten', ; Majmateno senkompara ;  
Porekskurso kaj promen'.." .....

'25 Pipenbek konsentis plene ; Kaj  
respondis kun komplez': ; "Jes, hodiaŭ  
frumatene ; Estas.. bela postajmez'!"  
.....)